


LA PONTO

Tweemaandelijks tijdschrift van de Limburgse Esperantovereniging.



Jaargang 5, nummer 6 (30) marto-aprilo 2013

Verschijnt op de eerste dag van iedere onpare maand.

Erkenningsnummer: P808228

V.U.: Pieter Jan Doumen, Peerderbaan 81, B-3940 Hechtel-Eksel

Tel. 011-73.20.47 – E-mail: pieter-jan.doumen@telenet.be

LA PONTO

Senpaga dumonata periodaĵo de la
Limburga Esperanto-Asocio (L.E.A.)

Aperas la unuan de ĉiu nepara monato.

Limdato por artikoloj : la 1-a de ĉiu para monato

Jarkolekto 5, n-ro 6 (30): marto-aprilo 2013

Ĉiuj antaŭaj numeroj ankoraŭ haveblas ĉe [http://
esperanto-forum.net/doc/LaPonto/archief.html](http://esperanto-forum.net/doc/LaPonto/archief.html).

Ĉiu rajtas fotokopii aŭ plusendi la revuon.

Reaktoro: Pieter Jan Doumen, Peerderbaan 81,
B-3940 Hechtel-Eksel – Tel. 011-73.20.47

Retadreso: pieter-jan.doumen@telenet.be

Karaj Gelegantoj!

Al preskaŭ ĉiuj gemaljunuloj la kuracistoj permesas uzi nur tre malmulte da salo aŭ tute ne uzi ĝin kun la celo malplialtigi la sangotension. Sed tio povas havi gravajn sekvojn, i.a. spontaneaj ostorompiĝoj. Mi konas geedzojn kiuj estis transportitaj al malsanulejo pro nekonata malsano. Tie la kuracistoj malkovris, ke ili estis preskaŭ senhidratigitaj (= .sekigitaj). Ili kredis, ke salo estas malsaniga, kaj tial ili tute ne uzis salon en la kuirejo, kvankam nenia kuracisto malpermesis ĝian uzon!

Prof. D-ro Jan Staessen, ĉefo de la sekcio Hipertensio kaj Kardiovaskulara Reaktivigo de la universitato de Loveno kaj liaj kunlaborantoj kuraĝis ataki unu el la plej sanktaj kardiologiaj dogmoj, nome tiu de salo kiel kaŭzo de alta hipertensio kaj kor- kaj angi-malsanoj. Multaj kardiologoj ne dankas ilin pro tio, kaj ankaŭ ne multaj kuracistoj...

Iuj gelegantoj certe demandis sin, kiel mi publikigas en Esperanto la historio de la Romia Imperio. La historio de Romo forte influis la Eŭropan civilizon, kaj tra ĝi la tutan reston de la mondo. Malgraŭ la krueleco, kiun oni trovas sur preskaŭ ĉiu paĝo de ĝia historio, oni ne povas ne admiri la realigojn de la loĝantoj de tiu urbo, kiu kreis mondan regnon kaj lasis al ni tiom da artaĵojn kaj belan literaturon. Certe ankaŭ mia ŝato de historio ludas gravan rolon en tio, kaj ne de militoj, kiel iu jam rimarki. Mi esperas, ke ankaŭ vi ŝatas tiun fascinan historion.

Pieter Jan Doumen

Plua historio de Esperanto (3)

Verdere geschiedenis van het Esperanto (3).

3. Esperanto en la mondo

Dum tiu ĉi komenca kongresa periodo Esperanto enpenetris iom post iom en la plej multajn fakojn de la praktika vivo.

La plej grava celo de la laboro por Esperanto estas la enkonduko de la lingvo en la lernejojn. Grandaj klopodoj estis faritaj por tiu celo, precipe post la unua mondmilito, kaj sukcesoj montriĝis en la plej multaj kulturitaj landoj. En 1939 Esperanto estis instruata en la diverspecaj lernejoj (popollernejoj, mezlernejoj, gimnazioj kaj liceoj, teĥnikaj lernejoj kaj universitatoj) en multaj landoj, plej ofte nedevige, sed kelkfoje ankaŭ devige. Precipe en Britujo kaj Francujo oni instruis Esperanton en multaj lernejoj, sed ankaŭ en Ĉeĥoslovakio, Hungarujo, Nederlando, Nov-Zelando, Usono kaj aliaj landoj. En kelkaj landoj troviĝis lektoroj de Esperanto ĉe teĥnikaj lernejoj kaj universitatoj. En aliaj landoj oficialaj dekretoj enkondukis aŭ permesis la Esperanto-instruadon (Aŭstrujo, Bulgarujo, Germanujo antaŭ la naziista epoko, Grekujo, k.a.). En ankoraŭ aliaj landoj la Esperanto-instruado ricevis ŝtatan subvencion (Finnlando, Hispanujo, Svedujo). En Hindujo kaj Japanujo Esperanto trovis intereson precipe en universitataj rondo.



Fotoj de Zamenhof kun la 1-a numero de 'La Esperantisto' kaj la pola, franca kaj angla tradukoj de la Unua Libro

En 1922 okazis en Ĝenevo internacia konferenco pri Esperanto en la lernejoj, en kiu partoprenis instruistoj el 28 landoj kaj reprezentantoj de 16 registaroj.

Okazis ankaŭ diversaj aliaj teĥnikaj konferencoj, kiuj diskutis pri la enkonduko de Esperanto en la internacian komercon, la sciencojn, la radion, la lernejojn, la internacian trafikon, la teĥnikon k.t.p. Kelkaj el tiuj ĉi konferencoj estis invitatitaj de komercaj ĉambroj aŭ aliaj oficialaj institucioj. Tre grava estis la unua mondkongreso de radioamatoroj en Parizo en aprilo 1925, kiu rekomendis Esperanton kiel radian kaj kongresan lingvon kaj rekomendis al ĉiuj radioamatoroj studi la lingvon, la Internacia Konferenco pri la uzado de Esperanto en sciencoj puraj kaj aplikataj, kaj la Dua Konfe-

renco por la uzado de Esperanto en komerco kaj industrio, kiuj ambaŭ okazis en Parizo en majo 1925. Ambaŭ konferencojn ĉeestis reprezentantoj de multaj registaroj kaj sciencaj akademioj aŭ komercaj ĉambroj, inter-naciaj foiroj kaj grandaj firmaoj. La konferencoj varme rekomendis la uzadon de la lingvo en sciencoj, ĝian enkondukon en komercajn lernejojn kaj en la internacian komercon. Oni konstatis, ke Esperanto jam estis la kvina plej grava lingvo en la internacia komerco.

En aliaj konferencoj Esperanto estis uzata kiel sola traduka lingvo ; estis konferencoj pri «paco por lernejoj», pri religiaj aŭ pedagogiaj aferoj aŭ pri turismo kaj reklamo.

Iom post iom multaj gravaj komercaj foiroj kaj firmaoj en diversaj landoj ekuzis Esperanton en siaj korespondado kaj reklamo, kaj ankaŭ la turismaj asocioj de multaj urboj eldonis turismajn reklamilojn kaj prospektojn en Esperanto.

En diversaj landoj la esperantistaj organizaĵoj komencis aranĝi komunajn vojaĝojn, precipe al Esperanto-kongresoj kaj aliaj kunvenoj, sed ankaŭ pure turismajn vojaĝojn.

En multaj landoj radiostacioj komencis plimalpli regulan dissendadon en Esperanto. Jam kelkajn jarojn antaŭ la dua mondmilito oni kalkulis, ke okazas meznombro kvin Esperanto-disaŭdigoj ĉiutage. Post la dua mondmilito precipe la ĉeĥoslovaka radio estis tre favora al Esperanto. El Prago oni sendis 2-3 programojn ĉiutage. Ankaŭ la franca radio dissendis ĉiutagan Esperanto-programon.

Kiam fondiĝis la Ligo de la Nacioj, jam dum ĝia unua kunveno en 1920 kelkaj delegitoj proponis rezolucion por rekomendi la instruadon de Esperanto en la lernejoj kaj petis la sekretariojn prepari raporton pri la Esperanto-instruado en la diversaj landoj. La afero estis prokrastita. La postan jaron la ĝenerala vicsekretario de la Ligo, D-ro Nitobé, vizitis la Esperanto-kongreson en Prago kaj skribis tre favoran raporton. Post tio la supre menciita propono estis akceptita, kaj la ĝenerala sekretario komencis grandskalan enketon pri la rezultoj de la Esperanto-instruado. Valoran materialon havigis al li ankaŭ la Konferenco pri Esperanto en Lernejoj, kiu okazis en la palaco de la Ligo de la Nacioj. La raporto pri ĉi tiu enketo estis akceptita en 1922.

La ĉefaj punktoj de la raporto temis pri Esperanto en la lernejoj kaj telegrafado. La demando pri Esperanto-instruado en lernejoj estis lasita al komisiono, kiu, pro politikaj



intrigoj, venis al la konkludo, ke ĝi devas rekomendi la studadon de «vivantaj lingvoj», sed la Ligo mem neniam akceptis tiun rezolucion. En 1924 la Ligo akceptis la rezolucion, en kiu oni rekomendis, ke Esperanto estu konsiderata kiel «klara lingvo» (ne kodo) en telegrafado, kaj la postan jaron la Universala Telegrafa Unio sekvis la rekomendon de la Ligo de la Nacioj kaj aprobis Esperanton kiel klaran lingvon. Tio signifas, ke telegrafante en Esperanto oni pagas laŭ vortoj kiel en aliaj lingvoj, kaj ne laŭ literoj, kiel oni faras telegrafante en ia kodo.

La internacia Laboroficejo de la Ligo de la Nacioj estis tre favora al Esperanto. Ĝi regule korespondis en la lingvo kaj ankaŭ eldonis diversajn dokumentojn en ĝi.

Tiujn ĉi sukcesojn ĉe la Ligo de la Nacioj oni ŝuldis ĉefe al la klopodoj de la konata Svisa esperantisto D-ro Edmond Privat.

Dum la jaro 1927 profesoro Dietterle entreprenis grandskalan statistikon pri la disvastiĝo de Esperanto en la mondo. Li venis al la nombro 125.000 esperantistoj en pli ol 7000 lokoj en pli ol cent landoj. Sed ja estis tute neeble trovi informojn pri ĉiuj, kiuj lernis la lingvon, kiu estis multe pli granda. Post tiu tempo la esperantistaro ankaŭ tre forte kreskis, ĉefe pro la multaj grandskalaj Cseh-metodaj kursoj en ĉiuj landoj.

4. Instruado de Esperanto – *Andreo Cseh*

La unuaj esperantistoj lernis Esperanton per meminstruado el malgrandaj lernolibroj, sed baldaŭ aperis pli grandaj lernolibroj en diversaj lingvoj, kaj oni komencis aranĝi kursojn. Ĝis ĉirkaŭ 1930 la kursoj en ĉiuj landoj estis ĝenerale gvidataj laŭ la malnova gramatika meto- do surbaze de tradukado el la gepatra lingvo.



Post tiu tempo la tiel nomata Cseh-metodo signis la transiron al la moderna rekta metodo de lingvoinstruado, ankaŭ en la instruado de Esperanto.

En 1920 la katolika pastro Andreo Cseh [Ĉe] gvidis Esperanto-kurson en Rumanujo. Lernolibroj ne estis haveblaj, kaj la lernantoj devenis de tri nacioj, tiel ke li ne povis uzi ian nacian lingvon. Tial Cseh ellaboris kurson en formo de konversacio pri ĉiutagaj temoj. Ekde la komenco de la kurso nur Esperanto estis uzata. Novaj vortoj estis instruataj per klaraj demonstracioj aŭ per jam lernitaj vortoj. La lecionojn li plenigis per spritaĵoj kaj humuraĵoj, kaj per ĥora respondado li igis la lernantojn tuj de la komenco paroli en Esperanto. Tio estas la principoj de la poste fame konata Cseh-metodo de Esperanto-instruado. Ĝi vekis grandan entuziasmon ĉe la lernantoj kaj la atenton de la pedagogiaj fakuloj.

Post la unua sukcesplena provo Cseh gvidis multajn kursojn en diversaj urboj en Rumanujo, sed post propagandvojaĝo tra Eŭropo li komencis en 1928 serion da kursoj en Svedujo kaj Estonujo. Ĉie li havis grandan sukceson, kaj li daŭrigis sian agadon ankaŭ en aliaj landoj. Dum la somero de 1930 li vizitis Norvegujon kaj gvidis du grandajn kursojn en la Universitato de Oslo.

En la komenco oni kredis, ke la sukceso de la kursoj dependas de la personeco de Cseh, sed baldaŭ ankaŭ aliaj esperantistoj montriĝis talentaj Cseh-metodaj instruistoj, kaj la metodo kaŭzis veran renesancon de Esperanto.

En 1930 Cseh fondis, kune kun S-ino Isbrücker en Hago la Internacian Cseh-Instituton de Esperanto, poste nomatan Internacia Instituto de Esperanto, kies celo estas havigi bonajn

instruistojn de Esperanto kaj doni al la instruistoj kaj kursaranĝantoj la necesan helpon. Krome la Instituto aranĝis ĉiujare en Arnhem internaciajn kursojn kaj seminariojn por instruistoj. Ĉiuj personoj, kiuj partoprenis en Cseh-metoda kurso, poste ricevis rajtigilon por mem povi gvidi kursojn, sed rekomendon ricevis nur tiuj, kiuj montris sin tute kapablaj instruistoj. Centoj da personoj jam ricevis la rajtigilon, kaj multaj el ili instruis Esperanton en diversaj landoj (Morariu, Seppik, F-ino Pähn, Baghy, Pragano, Schjerve). Kelkaj ankaŭ vivis nur per la instruado. La Instituto eldonis la ĉiumonatan ilustritan gazeton "La Praktiko" por havigi taŭgan legaĵon al la novaj esperantistoj. Ekde 1933 la Instituto havis en Hago propran domon kun kurssalono, oficejoj k.t.p.

La kursoj kiujn la Instituto aranĝis en Arnhem, faris tiom da impresoj al la urba estraro, ke en 1930 ĝi disponigis senpage al la Instituto belan domon en granda parko por esperantistaj kunvenoj kaj kursoj. Tiu ĉi Esperanto-domo en Arnhem enhavis hotelon kun restoracio. Ĝi akceptis esperantistajn gastojn dum la somero, kaj tie okazis la ĉiujaraj internaciaj kursoj kaj seminarioj de la Instituto.

Post la dua mondmilito la Instituto denove ekfunkciis.

En kelkaj landoj, ekz. en Norvegujo, oni post 1930 uzis preskaŭ nur la Cseh-metodon, ĉefe kun eksterlandaj instruistoj, en la instruado de komencantoj, sed en aliaj landoj, ekz. en Svedujo, oni uzis apude ankaŭ aliajn metodojn, parte kun enlandaj, parte kun eksterlandaj instruistoj.

Ankaŭ korespondaj kursoj ellaboriĝis en diversaj landoj kaj ludis gravan rolon en la laboro por disvastigi Esperanton, precipe en malgrandaj lokoj, kie oni ne povis aranĝi publikajn kursojn.

Multaj lernantoj vizitis la kursojn, sed estis granda problemo, kiel gajni la novajn esperantistojn por la movado. En tiu rilato la lokaj kluboj kaj la landaj asocioj ludis gravan rolon.

Laŭ Støp-Bowitz kaj Isbrücker

La naskolando de D-ro Zamenhof (Het geboorteland van Dr. Zamenhof)

En la junaĝo de D-ro Zamenhof ne ekzistis la nuna Litovujo en la etnografia senco. Sed estis tre vivaj tradicioj de la malnova historia Litvo, kiel faris A. Grabowski en la antaŭparolo al sia traduko en Esperanto de *Sinjoro Tadeo*. Tiu ŝtato, kiu estis parto de Polujo ekde 1569 ĝis 1795, ampleksis krom la nuna Litovujo, Bela-

rusujon, Ukrainon, Volhinion kaj Podolion. Tiu vasta regno estis loĝata de Belorusoj, Rute-noj, Poloj k.a. Nur parteto estis loĝata de Lito-voj, kiuj en tiu epoko ne konsciis pri sia nacie-co. Post la Napoleonaj militoj, la Viena Kon-greso en 1815 faris dispartigon : ĝi kreis la Po-lan Reĝlandon (Pollingve Krolestwo Polskie), kies ĉefurbo estis Varsovio. La teritoriojn kuŝantajn oriente de la Pola Reĝlando oni plu nomis Litvo (pollingve Litwa). La nomo Lit-vano do ne signifas apartenon al la litova gen-to, sed apartenon al tiu iama grupo de terito-rioj. En tiu senco nomis sin litvanoj la plej granda pola poeto Adam Mickiewicz kaj la pola heroo Tadeo Kosciuszko, la ĉefa figuro



Zamenhof inter kelkaj Varsoviaj esperantistoj : la dua persono de dekstre malsupre : D-ro Antoni Grabowski

de lia epopeo *Sinjoro Tadeo*. Ankaŭ en tiu senco Zamenhof parolis pri «Litovujo (= Litvo), mia malfeliĉa patrujo». Efektive Bjalistoko, kie Zamenhof naskiĝis kaj pasigis sian infane-con, kuŝis dum cent jaroj – de 1815 ĝis 1915 – ekster la limoj de la Pola Reĝlando, en la gubernio Grodno. Ankoraŭ en 1915 la ĉefo de la renaskiĝanta Pollando Pilsudski penis rekrei la historian regnon kaj publikigis alvokon «al la popoloj de la estinta litva grandduklando». Ankaŭ tiutempe la litovaj naciistoj revis rekonstrui sian iaman potencon regnon, sed sen unuiĝo kun Polujo.

La provoj de la polaj kaj litovaj naciistoj same malsukcesis. La regiono Suwalski estis dispartigita inter Polujo kaj Litovujo tuj post la unua mondmilito : tie la problemo estis iom pli facila, ĉar la etnografia limo estis sufiĉe klara. La regiono de Bialistoko, plejparte loĝata de polaj kamparanoj, fariĝis parto de la renaskiĝanta Polujo: eĉ post la dua mondmilito tiu stato estis respektata. La regiono Grodno, kie loĝis Poloj kaj Belorusoj, fariĝis, laŭ la ideo de

Stalin, parto de la soveta Belorusujo, kaj la Poloj kiuj loĝis tie, estis transportitaj al la nuna Polujo. Pri la regiono de Vilno (litvolingve «Vilnius»), kiu estis tradicie disputata inter Poloj kaj Litovoj, Stalin decidis transdoni tiun urbon al la Litovoj kiel ĉefurbon, kaj la Pola loĝantaro devis elmigri de tie. Tiamaniere la nacia demando estis solvita alie, ol esperis Zamenhof, ĉar oni starigis ŝtatojn konstruitajn sur nacia bazo. Zamenhof mem uzis la rusan formon «Bjeli-stok » anstataŭ la pola Bjaly-stok, ĉar la vorto «blanka» estas Pole «bialy», sed Ruse «bjelij». La vorto «stok» signifas «kunfluejo» en ambaŭ lingvoj.

Bjalistoko kaj ĝia ĉirkaŭaĵo restis ja dum cent jaroj ekster la Pola Reĝlando, sed ĝi nekonstesteble apartenas al la Pola etnografia teritorio, kaj tial estas pli logike uzi en Esperanto formon kiu estas pli proksima al la Pola.

Parolante pri Rusoj kaj Germanoj en la tiama Bjalistoko, oni devas scii, ke tiuj elementoj ne apartenis al la indeĝena loĝantaro. Rusoj, kiuj loĝis en tiu urbo, estis oficistoj, militistoj, policanoj, instruistoj (ĉar la instruado devis okazi nur en la rusa lingvo) aŭ eĉ komercistoj, kiuj ricevis privilegion de la rusa registaro.

En la komenco de la kapitalisma periodo Bjalistoko ricevis la karakteron de industria urbo, kaj tie estis fonditaj per germana kapitalo speciale grandaj teksfabrikoj, al kiuj la Rusa registaro koncedis specialajn privilegiojn. Kompreneble la fabrikposedantoj dungis kiel helpantojn Germanajn oficistojn, kiuj helpis al ili ekspluati la laboristaron, kiu estis grandparte Pola. (Kazimierz Domoslowski)

Novajoj el Esperantolando

(Nieuws uit Esperantoland)

Urugvajo – *La venko en Montevideo* –

La 8-a de decembro estas la datreveno de la komenco de la oficialaj rilatoj inter UEA kaj Unesko. En tiu tago de 1954 la Plenumkomitato de Unesko donis al UEA la statuson, kiu tiam nomiĝis «konsultaj rilatoj». Ekde la jaro 2012 la termino estas «konsulta partnereco». Nur 371 neregistaraj organizaĵoj havas tiun oficialan statuson ĉe Unesko. Malmultaj el ili povas fieri pri same longa kunlaboro kun tiu monda organizaĵo kiel UEA.

Du tagojn poste, la 10-an de decembro 1954, la Ĝenerala Konferenco de Unesko akceptis la faman rezolucion pri Esperanto, kiu legeblas komence de ĉiu Jarlibro de UEA, kune kun la dua rezolucio el 1985. Cetere ĉiu esperantisto

povas hodiaŭ fieri pri la oficiala rilato de UEA kun la speciala agentejo de la UN-sistemo pri edukado, scienco kaj kulturo, Unesko, en la statuso de konsulta partnereco ekde 1954. Ekde 1998 UEA estas en speciala konsulta rilato kun la Ekonomia kaj Socia Konsilio (EKOSOK) de UN (kiu kunordigas la agadon ankaŭ de Unesko kun UN, la ŝtatoj kaj aliaj organoj de la UN-sistemo), kaj tiel UEA rajtas akrediti siajn reprezentantojn ĉe la oficejoj de UN en Ĝenevo, Novjorko kaj Vieno, same kiel ĉe Unesko en Parizo, jaron post jaro, kun la ebleco aktive partopreni, alparoli kaj agi en eventoj de tiuj organizaĵoj. (Szilvási L.)

(Ret-Info, Eventoj, Hungario)

Slovakio – Petro Baláž esperantisto de 2012 –

La revuo “La Ondo de Esperanto” iniciatis en 1998 ĉiujaran proklamon de la Esperantisto de la Jaro. En la jaro 2012 15 kandidatigantoj proponis 21 kandidatojn, al kiuj ili donis jenajn nombrojn da voĉoj.

Peter Baláž: 7 – Hori Yasuo kaj Stefan Mac-Gill: 5 – Kalle Kniivilä: 4 – Mireille Grosjean kaj Perla Minelli: 3 – kvar kandidatoj ricevis po 2 voĉojn kaj tri po 1 voĉon.

Rezulte do, la elektito de 2012 iĝis Peter Baláž, 33-jara Slovaka esperantisto, kunordiganto de la asocio [Edukado@Interreto \(E@I\)](mailto:Edukado@Interreto) pro la starigo, la evoluigo kaj la prizorgo de gravaj retaj projektoj; modela kunlaboro kun landaj kaj Eŭropaj instancoj; okazigo de la Somera Esperanto-Lernejo kaj de la scienca konferenco KAEST; eldono de gravaj diskaj, libroj, broŝuroj kaj filmoj en kaj pri Esperanto; kaj pro tio, ke li sukcesas stimuli kaj (re)aktivigi multajn talentajn gejunulojn, kiuj sen tio eble perdus sian intereson pri Esperanto. Sincerajn gratulojn al Peter Baláž! (Szilvási L.)

(Ret-Info, Eventoj, Hungario)

Hungario – Pli ol 4400 fakaj verkoj en E-o! –

Por ricevi sian universitan diplomon studentoj en Hungario devas fari ankaŭ ekzamenon pri iu fremda lingvo. En la baza, bakalaŭra nivelo en multaj universitatoj ankaŭ Esperanto estas akceptata, sed en la mastera grado (msc) – laŭ antaŭpasintjara leĝo – oni akceptas nur tiujn lingvojn, en kiu pruveble ekzistas scienca kaj faka literaturo.

Por helpi la studentojn de la koncernaj fakoj ni en la Esperanto-Centro Eventoj kompilis libroliston pri fakaj kaj sciencaj libroj eldonitaj aŭ aperintaj en Esperanto – nekonsidere ilian nunan aĉeteblon.



Nia listo enhavas 4401 elementojn el la sekvaj fontoj:

- ĉiuj materialoj de STEB (Scienca kaj Teknika Esperanto-Biblioteko) ĉe www.eventoj.hu;
- libroj en la libroservo de UEA en la kategorio scienco kaj tekniko;
- libroj kun scienca kaj teknika enhavo en la katalogo de Kolektaĵo Fajsz;
- artikoloj el Scienca Revuo en retejo ĉe Eventoj;
- artikoloj el la scienca revuo Teleskopo;
- artikoloj el Jura Revuo;
- listo pri aperintaj vortaroj en la retejo de UEA;
- enhavo de la verko “Fakverkoj” de Miroslav Malovec;
- librolisto en broŝuro de Rátkaj Árpá pri faka aplikado, ktp.

Ni konscias, ke la listo atingebla ĉe la adreso: <http://www.eventoj.hu/sciencverkoj/> ne estas kompleta. Nia celo estas helpi la juran agnoskon de Esperanto en la Hungaraj universitatoj. Ni ĝojas, se ni povas iom helpi pligrandigi la prestiĝon de Esperanto. La nuna fazo estas la rezulto de plurmonata laboro. Se iu volos daŭrigi kaj plikompleti la materialon, ni volonte transdonos al li la fontan xls-dosieron. (Szilvási L. kaj Mészáros I.)

(Ret-Info, Eventoj, Hungario)

Francio – Tutmonda subskriba maratono –

Ankaŭ vi povis kontribui per Esperanto al la tutmonda diskonigo de tiu ĉi kampanjo de Amnestio Internacia, kiu daŭris de la 7a ĝis la 16a de decembro 2012. En 2011 estis kolektitaj 1.376.492 subskriboj.

La kampanjo estas ĉiujare aranĝata por subteni senkulpajn homojn aŭ homojn kies kulpo

*Met de hartelijke groeten van
Kun la koraj salutoj de*

KBC-Bank Hechtel

Rode Kruisplein 5
B-3940 Hechtel
Tel. 011-73.02.20
Fax 011-73.02.21
hechtel@kbc.be

ne estas pruvita aŭ nepruvebla kaj en danĝero de forgeso, de malapero aŭ eĉ de morto, nun malliberigitaj en multaj landoj, viktimoj de torturo kaj brutala pritraktado.

Jen kelkaj ekzemploj.

Membroj de Girifna en Sudano estas viktimoj de la naciaj servoj de sekureco, pro tio ke ili pace aktivis por la Homoj Rajtoj kaj demokratio. Membroj de la Centro por la Defendo de la Homaj Rajtoj estis malliberigitaj en Irano pro tio ke ili defendis la Homajn Raj-tojn. En Tajvano viro estis kondamnita al morto, kvankam ne ekzistas pruvo, ke li mur-dis du personojn. Jam antaŭe ekzistis kazoj de agnosko de nepruvita krimo, sed konfesita sub torturo fare de policianoj kaj prokuroroj. En Egipto virino estis batita kaj grave vundita fare de policianoj, pro tio ke ŝi volis helpi aliajn virinojn kiujn soldatoj senvestigis. Ŝi postulas enketon kaj kompenson de la damaĝoj kiujn ŝi plu suferas.

La subskriboj ne estas vanaj. Pri tio atestas la bonaj novaĵoj el Meksiko, Turkio, Kameruno, Azerbajĝano, Niĝerio, kie personoj estis liberigitaj pro peticikampanjoj de Amnestio Internacia en diversaj landoj.

(Henri Masson, Francio)

Salo estas saniga !

(Zout is gezond !)

Malmulte aŭ tro malmulte da salo efektive estas pli danĝera ol (tro) multe. Tion pruvas la malsupre menciita studo.

Dum ok jaroj 3.681 viroj inter 18 kaj 60 jaroj en diversaj Eŭropaj landoj estis kontrolitaj pri sia uzo de salo kaj ĝia efekto sur la sangotensio kaj koro. La testpersonoj estis subdividitaj en tri grupojn : tiuj kiuj konsumis ĉiutage respektive 10 gr, 5 gr kaj 2 gr.

Kaj kio montriĝis ? Tiuj kiuj konsumis la plej grandan kvanton ne havis pli altan sang-tension

ol la ekonomiaj uzantoj de salo. Anko-raŭ pli forte : en la grupo de la plej ekonomiaj saluzantoj (2 gr tage) mortis kvarfoje pli da personoj sekve de kor- kaj angimalsanoj ol en la grupo de la uzantoj de 10 gr tage.

Konkludo : (tro) malmulte da salo plialtigas la riskon de kor- kaj angimalsanoj kaj kaŭzas pli da mortoj.

Prof. Staessen : «Se ni konsumas malmulte da salo, nia organismo faras ĉion por teni en ĝi la ankoraŭ ĉeestan salon, nome per plialtigita farado de certaj hormonoj en la surrenaj glandoj. Kaj en la daŭro tio tro ŝargas la koron kaj angiojn. Oni devas do esti singarda pri malmultsalaj dietoj. Meti la meznombran loĝantaron al salmalriĉa dieto ne estas sendanĝere.»

D-ro Martin Reineke, ĉefkuracisto de la Interna Medicino de la universitato Ludwig-Maximilian diris : «Nur ĉe kelkaj difinitaj gravaj malsanoj kiel hepatocirozo, tre alta sangotensio aŭ manko de la renfunkcio oni devas grave limigi la salkonsumon.»

La antaŭaj studoj pruvis ke eĉ ĉe alta salkonsumo la sangotensio plialtiĝas nur per 1 aŭ 2 mmHg, kaj ĉe maljunaj homoj per maksimume 5 mmHg. En normala homa lingvo tio signifas por la supra tensio de 14 al 14,1-14,2 kaj 14,5. Kaj ke ĉe forta sallimigo la sangotensio malaltiĝas nur per 1 mmHg, aŭ de 14 al 13.9 aŭ de 19 al 18,9.

Jam fine de la naŭdekaj jaroj de la antaŭa jarcento la Albert Einstein College of Medicine (Medicina Universtitato Albert Einstein) en Nov-Jorko konkludis, ke la mortrisiko preskaŭ duobliĝas ĉe homoj kun tro malalta salkonsumo kompare kun (tro) alta konsumo.

Sed estas ankoraŭ pli ! Ĉe salmalriĉa kaj eĉ ĉe tiel nomata sensala dieto la organismo retiras salon al la ostoj por teni sufiĉe alta ĝian titron en la sango. Manko je salo, pro kio ofte suferas gemaljunuloj, certe en la maljunulejoj, rezultas en ostsenkalkigo (osteomalacio) kaj malvigleco. Eĉ se estas vere, ke ekstreme alta salkonsumo estas malbona por la ostoj. Estas nur unu kazo, en kiu oni devas manĝi preskaŭ sen salo, nome ĉe la uzo de kortizono.

Cetere tro malmulta salo malfaciligas la malŝargon de muko. Sufiĉe da salo ankaŭ necesas por elpeli acidojn el nia organismo. Alta acidotitro povas grave damaĝi la heredan DNA kaj tiel pligrandigi la riskon de kancero.



Vera salo : la rozkolora saniga Himalaja salo

Senhidратиĝo (senakviĝo) de la korpo sekve de manko je akvo, kiun oni ofte konstatas ĉe gemaljunuloj, plialtigas la sangtension kaj ĝenas bonan renfunckiadon, kio siavice plialtigas la sangtension. Kaj tiam venas kuracisto, kiu preskribas urinadpilolojn, pro kio la senhidратиĝo ankoraŭ plialtiĝas, la renoj estas trasangataj ankoraŭ pli malbone kaj, en la plej oftaj kazoj, estas elpelata ankaŭ kalcio, la protektanto de la koro, la plimalaltiganto de la sangotensio kaj kontraŭulo de natrio.

En la nuna medicino, se temas pri salo, oni malofte aŭ tute ne konsideras la konsumon de akvo kaj la naturon de la salo. Multaj malsanoj estas kaŭzataj de nerimarkata senhidратиĝo. Por salo validas la samo kiel por sukero: la plej multaj homoj uzas tro da ili. Krome ili konsumas ĝiajn plej malbonajn specojn, kiuj troviĝas kaŝitaj en preskaŭ ĉiuj industrie farataj tute konsumpretaj nutraĵoj.

Tabla aŭ kuireja salo estas pura natrioklorido (NaCl) kaj senigita de ĉirkaŭ okdek akompanaj mineraloj-sporelementoj, kiuj troviĝas en natura marsalo. Plenvaloran salon oni trovas ankaŭ en ĉiovendejoj. En la bonaj naturven-dejoj oni trovas la rozkoloran, agrablagustan salo de Himalajo. Kaj kiu pro medicinaj kialoj devas tre ekonomie konsumi salon, tiu prenu la salon Lo, havebla en ĉiovendejoj. Ĝi entenas 66% malpli da natrio (Na) kaj precipe kalion (K), la kontraŭulo de natrio.

Evitu kiel eble plej la sterilan ordinaran kuirejan salon kaj la tute pretigitajn industriajn konservojn kaj aliajn nutraĵojn.

Konsumu veran marsalon, modermaniere sed sufiĉe, kaj ne lasu ĝin kuiri aŭ rosti kun la nutraĵo. Stimulu gemaljunulojn al trinkado de sufiĉe da akvo kaj donacu al ili de tempo al tempo poteton da plenvalora salo.

(El la revuo 'Maar natuurlijk')

Historio de la Romia Imperio (2)

(Geschiedenis van het Romeinse Rijk 2)

2. La lukto inter patricioj kaj plebanoj

La koncedoj al la riĉiĝintaj plebanoj tute ne kontentigis la aliajn plebanojn. Sekve de la militoj kontraŭ la Etruskoj kaj la Sabenoj la klaso de la plebanoj multe malriĉiĝis. Ili ne plu kapablis repagi siajn patriciajn kreditorojn kaj tial postulis, ke la Senato abolu la skandalan kutimon, kiu rajtigis Roman civitanon sklavigi siajn ŝuldantojn. Sed kiam la Senato plu rifuzis, ili forlasis Romon dum milito kontraŭ la Volskoj kaj elmigris al la Sankta Monto (493). La katastrofaj sekvoj de tiu elmigro devigis la patriciojn cedi. Oni abolis la sklavecon de la ŝuldantoj, kaj la plebo povis elekti tribunojn, kiuj rajtis nuligi la decidojn de la senato kiuj kontraŭis la bonstaton de la popolo.

Tiu politika lukto de la plebanoj por ĝui la samajn rajtojn kiel la patricioj daŭros du jarcentojn.

En jurisdikcio la Romaj juĝistoj aplikis la kutimjuron (*mos majorum*). Ĉar tiu ebligis arbitron, tribunon postulis skribitan leĝaron. Post dek jaroj da rezisto la senato nomumis dek magistratojn, la tiel nomatajn *decemviri*, kiuj redaktis leĝaron. La leĝoj estis gravuritaj sur dek du bronzaĵoj (451).

En 449 la plebo ricevis la rajton kunveni por interkonsiliĝi pri siaj interesoj en la *comitia curiata*. La decidoj de tiu *comitia*, la plebiscitoj, havis leĝan povon. Ili garantiis la egalecon de ĉiuj civitanoj. En 445 la plebanoj ricevis ankaŭ socian egalecon, nome la rajton kontrakti laŭleĝan geedziĝon kun patricioj.

La tribunoj daŭre postulis kampoleĝon. Nur en 367 la tribunon Licinio aprobis leĝon, kiu malpermesis la riĉulojn posedi pli ol 125 ha. Kio restis, devis esti partigita inter la malriĉaj civitanoj. En la sama jaro estis decidite, ke unu el la konsuloj devas esti plebano.

Kun la celo konservi gravan parton de siaj privilegioj en la senato, la patricioj nomumis censistojn (*censores*), kiuj faris listojn de la civitanoj kaj definis ĉies impostojn. Ili ankaŭ kontrolis la morojn de senatanoj kaj rajtis forigi el la senato la civitanojn kies konduto estis malmorala (443). Ekde 350 ankaŭ plebanoj rajtis ekzerci tiun oficon, same kiel tiu de *pretor*, *aedilis* kaj sacerdoto. La pretoroj estis ŝarĝitaj per la jurisdikcio, kaj la ediloj per la administrado de la publikaj laboroj. Edilo, pretoro kaj konsulo estis la t.n. honoraj oficoj (*cursus honorum*). Ĉirkaŭ 300 a.K. la Roma ŝtato estis demokrata respubliko.

3. Konstantaj militoj

La invado de la Gaŭlaj Senonoj, kiuj jam du jarcentoj loĝis en la ebenaĵo de Po, minacis en 390 neniigi Romon. Ili venkis la Romanojn sur la bordoj de Alio (Allia) je kelkaj mejloj de Romo. La venkitoj devis retiriĝi sur la Kapitolio, la burgo de Romo, kiun la Gaŭloj ne povis superforti. Nokte la Gaŭloj provis surgrimpiti la burgon, sed la sanktaj anseroj de Juno vekis la defendantojn. Gvidataj de diktatoro Kamilo (Camillus) la Romanoj plurfoje venkis la Gaŭlojn, kiuj retiriĝis trans Po..

La Latinoj, la Sabenoj kaj la Etruskoj estis laŭvice submetitaj de la Romanoj. La Samnitoj, kiuj surprizatakis kaj venkis Roman armeon kaj devigis ĝin pasi sub la jugo apud la Kaŭdenaj montpasejoj, devis fine rekonstrui la aŭtoritaton de Romo (321)

Ĉirkaŭ 275 la Romanoj estis venkitaj de Pirro (Pyrrhus), reĝo de Epiro, en kies armeo troviĝis elefantoj, kiuj fortimigis la ĉevalojn. Ili fine venkis lin kaj forpelis lin el Italio.

Escepte de *Gallia Cisalpina* (Gaŭlio cis la Alpoj) la tuta Italio apartenis al Romo, kiu disponis de armeo de preskaŭ 300.000 bone ekipitaj soldatoj. En la konkeritaj regionoj ili konstruis fortikaĵojn, kie restadis garnizonoj kaj kiuj estis interligitaj per armevojoj. Al la Roma organiza talento oni devas aldoni la morala valoro de la Romaj legionuloj, kiuj konis nur devon kaj disciplinon.

4. La Punikaj militoj (264-146 a.K.)

En la IX-a jarcento a.K. Fenicioj el Tiro (Tyros) fondis sur la bordo de Nord-Afriko la urbon Kartago sur la loko kie nun proksimume troviĝas Tunizo. Ĝi regis super la norda bordo de Afriko, okcidenta Sicilio, Korsiko kaj Sardinio. Krome ĝi posedis komercajn kontorojn en Hispanio, kaj ĝiaj karavanoj profunde penetris en Afrikon kaj Gaŭlion.

La tre riĉa Kartago estis aristokrata respubliko, regata de du *sufetoj* kaj senato. Ĉekape de la riĉuloj staris Hanno, dum la militista popola partio grupiĝis ĉirkaŭ la familio Barkas. Kartago havis armeon de solduloj kaj grandegan ŝiparon, kiuj dominis la tutan Mediteraneon. Ekde la momento kiam la Romanoj konkeris Sud-Italion, estis klare, ke Kartago renkontos potencon rivalon, kiu ambiciis konkeri Sicilion. Ambaŭ mediteraneaj respublikoj, unu Arja kaj la alia Semita, ambiciis disvastigi sian potencon, kaj do milito inter la du rivaloj estis neevitebla. La sesdektrijarojn daŭranta giganta lukto inter ili estis nomata de la Romanoj la

Punikaj Militoj, t.e. la militoj kontraŭ la *Poeni*, kiel la Romanoj nomis ilin.

La Kartaganoj, kiuj jam posedis okcidentan Sicilion, faris aliancon kun Sirakuzo kontraŭ la Italaj Mamertenoj, kiuj konkeris Mesinon. La Mamertenoj siavice petis la helpon de Romo. La senato tuj ordonis konstrui ŝiparon kaj sendis ĝin al Sicilio, kie la Romanoj dum marbatalo en 260 venkis la Kartaganojn. La Roma terarmeo, kiu estis longe retenata de Hamil-karo Barkas, la patro de Hanibalo, fine sukcesis venki la Kartagan armeon. Kartago petis pacon. Ĝi devis pagi al Romo altan militkom-pensaĵon, sed ankaŭ cedi okcidentan Sicilion kaj iom poste ankaŭ Sardinion kaj Korsikon.



Roma militŝipo kun soldatoj.

La dua Punika milito okazis en Hispanio. Por kompensi la suferitan perdon Kartago sendis Hamilkaron Barkas al Hispanio por konkeri ties sudan parton. Lia filo Hanibalo, kiu ĵuris eternan malamon al Romo, sukcesis lin kiel ĉefkomandanto. Senhezite li faris la planon venki Romon en Italio mem.

Malgraŭ la pactraktato kun Romo, Hanibalo sieĝis en Hispanio la urbon Sagunto, aliancanon de Romo, kiu sendis delegacion al Kartago. Ĉar Romo ne tuj ricevis kontentigan respondon de Kartago, ĝi deklaris militon al ĝi.

Post la konkero de Sagunto Hanibalo transiris komence de 218 la Pireneojn, venkis la tieajn Gaŭlojn, transiris la Alpojn kaj invadis Italion. La cisalpaj Gaŭloj, malamikoj de Romo, aliĝis al li. Li venkis la Romanojn apud la riveroj Tesino kaj Trebio kaj, je perdo de multegaj homaj vivoj, li neniigis en 217 fortan Roman armeon apud la lago Trasimeno.

Timigita per tiom da katastrofoj la Romanoj nomigis la patricion Fabio Maksimo diktatoro.

Tiu ĉi evitis ĉiun grandan batalon, sed daŭre rapide atakis la malamikan armeon kaj tuj retiriĝis. Tiel li volis gajni tempon por prepari sian propran planon. Tial la Romanoj nomis lin *cunctator* (hezitanto).

Tiu taktiko ne plaĉis al la senato, kiu deziris tujan agadon. Tial ĝi elektis la plebanon Varo konsulo. Kvankam la armeo de Romo estis duoble pli granda ol tiu de Hanibalo, tiu ĉi venkis la Romanojn dum unu el la plej sangecaj bataloj de la Antikva Erao apud Kanoj (*Cannae*) en 216. Tiu batalo estis vera katastrofo por Romo. Sepdek mil Romanoj, inter kiuj konsulo Paŭlo Emilio, okdek senatanoj kaj grandan parton de la kavalirklaso, mortis.

Sed Hanibalo timis ataki Romon, kies rezistopovon li konis, kaj pasis la vintron en Kapuo (Capua). Tie li atendis helptrupojn el Kartago, kiujn li urĝe bezonis. Kiam Kartago rifuzis sendi trupojn, li petis helpon de sia frato, Hasdrubalo, kiu komandis la trupojn en Hispanio kaj faris aliancon kun la reĝo de Macedonio. Hasdrubalo iris al Italio, sed tie estis venkita. Tiam Romo superfortis Sirakuson (Syracusa) kaj venkis Filipon de Macedonio. Intertempe la du fratoj Skipiono (*Scipio*) forprenis Hispanion al Kartago.

Konsulo Publius Skipiono transmetis sian armeon al Afriko kaj faris aliancon kun Masiniso, la detronigita reĝo de Numidio. Tiam Kartago vokis Hanibalon hejmen, kiu siavice transiris al Afriko kun sia armeo. Ĉe Zamo li provis la saman taktikon kiel apud Kanoj (*Cannae*), sed Skipiono venkis lin. Kartago petis pacon. La kondiĉoj de Skipiono estis senkompataj. Kartago devis liveri al Romo sian tutan ŝiparon, pagi 10.000 oraj talentoj da militkompensaĵo, forlasi ĉiujn sian posedojn ekster Afriko kaj promesi ne militi sen la permeso de Romo (201). Ĉar Romo postulis la liveron de Hanibalo, tiu ĉi fuĝis al Azio, sed la Romanoj persekutis lin. Li finfine mortigis sin.

La tria Punika Milito (149-146) finiĝis per la detruo de Kartago. Masiniso, aliancano de Romo, daŭre kaŭzis problemojn kun Kartago, de kiu li forprenis senpune plurajn teritoriojn. Por ekzameni la plendojn de Kartago, Romo sendis tien Katon (*Cato*) la Maljunan. La prospero de la urbo, la haveno kun la nova ŝiparo, ĝiaj belegaj konstruaĵoj vekis la admiron kaj la malamon de la Romano, kiu, reveninte en Romo, post ĉiu parolado en la senato ripetis: *Ceterum censeo Kathaginem esse delendam* (Cetere mi opinias, ke Kartago estas detruenda).

Devigite defendi sin kontraŭ la atakoj de Masiniso, Kartago estis akuzita de Romo pri rompo de la pactraktato. La Romaj armeestroj Postulis, ke la Kartaganoj forlasu sian urbon kaj ekloĝu je dek mejloj de la maro en urbo sen muroj. Indigna, Kartago fermis siajn pordegojn kaj preparis sin al rezisto, sed la urbo estis ekokupita, kaj la defendantoj mortis en la fajron, kiun ili mem bruligis (146). La soldatoj de Skipiono detruis ĉion kio ankoraŭ restis de la urbo, kaj li deklaris la teritorion Roma provinco.

Post tio ili punis la aliancanoj de Hanibalo en cisalpa Gaŭlio (ebenaĵo de Po) kaj konkeris la sudon de Gaŭlio (Francio) kaj la bordo de Mediteraneo, el kiuj teritorio ili kaj faris ankaŭ provincon. Al tio la regiono dankas sian Francan nomon *la Provence* (Provenco).

Post kiam ili venkis Perseon (Perseus), la reĝon de Macedonio, ankaŭ ties reĝlando fariĝis Roma provinco (168). En 146 Grekio suferis la saman sorton. Jam en 191 ili venkis Antioĥon, la reĝon de Sirio, kiu gastame ricevis Hanibalon. En 133 Atalo III, la reĝo de Pergamono, testamentis sian reĝlandon al Romo, kiu ekposedis ĝin en 129.

Aktivaĵoj de la Limburga Esperanto-Asocio (L.E.A.)

Pasintaj aktivaĵoj :

Ĵaŭdon, la 31.01.2013 : Kartludado

Kvin personoj ludis ĵokeron sub gvidado de Rik Leijskens. Henri Schutters kaj Paul Hotterbeekx ne povis ĉeesti kaj senkulpigis sin. Hendrik Schoofs gajnis.

Ĵaŭdon, la 28.02.2013 : Vortludado

Henri Schutters gvidis la vortludon «Divenu literon». Por ĉiu ĝuste divenita litero oni ricevis unu poenton. Gajnis Ben Indestege .

Estontaj aktivaĵoj :

Ĵaŭdon, la 28.03.2013 : Kantovespero

Sur sia gitaro Paul Hotterbeekx akompanos la esperantan kantadon, kiun gvidos Pieter Jan Doumen.

Ĵaŭdon, la 25.04.2013 : Komputila lingvo

An Olijslagers prelegos pri la eblecoj de la interreto.

ĈIUJ esperantistoj estas bonvenaj!

Enhavo de tiu ĉi numero de ‘La Ponto’:

- Paĝo 2: Kolofono
Redaktore...
Plua historio de Esperanto (3) (*Støp-Bowitz kaj Isbrücker*)
- Paĝo 4: La naskolando de D-ro Zamenhof (*Kazimierz Domoslawski*)
- Paĝo 5: Novaĵoj el Esperantolando:
- Urugvajo: La venko en Montevideo (*Ret-Info, Eventoj, Hungario*)
- Paĝo 6: - Slovakio: Petro Baláž esperantosto de 2012 (*Ret-Info, Eventoj, Hungario*)
- Hungario: Pli ol 4400 fakaj verkoj en E-o! (*Ret-Info, Eventoj, Hungario*)
- Francio: Tutmonda maratono de subskriboj (*Henri Masson, Francio*)
- Paĝo 7: Salo estas saniga ! (*Revuo ‘Maar natuurlijk’*)
- Paĝo 8: Historio de la Romia Imperio (2) (*El diversaj fontoj*)
- Paĝo 10: Aktivaĵoj de la Limburga Esperanto-Asocio (L.E.A.)
-

Lernu Esperanton!

Kiom da fojoj ni ne staras en fremda lando kun frostinta lingvo, ne kapablaj paroli la lingvon de la tieaj homoj? La mondo bezonas supranacian, duan lingvon. Sola Esperanto ofertas vere demokratan solvon por tiu problemo, ĉar per ĝia ekonomia kaj politika neŭtraleco ĝi metas ĉiujn homojn sur egalan nivelon. Ĝi estas ne nur la plej facila lingvo en la mondo kaj la sola, kiu estas tute regula – ĝia grammatiko ne havas esceptojn –, sed ĝi pledas ankaŭ por egalaj rajtoj por ĉiuj popoloj. “Kiom da lingvoj oni parolas, tiom da fojoj oni estas homo”, diris imperiestro Karlo V. Tamen homo bezonas, ekster sia dialekto, nur du lingvojn: sian nacian lingvon kaj Esperanton. Esperanto ne volas anstataŭigi la naciajn lingvojn, kiel pensas multaj homoj, sed jes servi kiel komunikilo inter homoj, kiuj ne havas la saman gepatran lingvon.

Leer Esperanto!

Hoe vaak staan wij niet in een vreemd land met de mond vol tanden, niet in staat de taal te spreken van de mensen aldaar? De wereld heeft een supranationale, tweede taal nodig. Alleen Esperanto biedt een echt democratische oplossing voor dat probleem, want door zijn economische en politieke neutraliteit plaatst het alle mensen op gelijke voet. Het is niet alleen de eenvoudigste taal ter wereld en de enige die volledig regelmatig is – haar grammatica heeft geen uitzonderingen –, maar zij pleit ook voor gelijke rechten voor alle volkeren. “Zoveel talen als men spreekt, zo vaak is men mens,” zei keizer Karel V. Nochtans heeft een mens behalve zijn dialect maar twee talen nodig: zijn nationale taal en Esperanto. Esperanto wil niet de nationale talen vervangen, zoals sommigen denken, maar wel dienen als communicatiemiddel tussen mensen die niet dezelfde moedertaal hebben.

Apprends l’Espéranto!

Combien de fois ne restons-nous pas bouche bée dans un pays étranger, incapables de parler la langue des indigènes ? Le monde a besoin d’une langue supranationale. Seul l’Espéranto offre une solution vraiment démocratique à ce problème, car, par sa neutralité économique et politique, il met tous les hommes sur un pied d’égalité. Ce n’est pas que la langue la plus simple au monde et la seule qui soit tout à fait régulière – sa grammaire n’a pas d’exceptions –, mais il plaide aussi pour des droits égaux pour tous les peuples. "Autant de langues on parle, autant de fois on est homme," a dit l’empereur Charles-Quint. Pourtant un homme n’a besoin, hors de son dialecte, que de deux langues: sa langue nationale et l’Espéranto, qui ne veut pas remplacer les langues nationales, comme pensent certains, mais servir de moyen de communication entre les gens qui n’ont pas la même langue maternelle.